

La Informilo de NEC

センター通信

第268号

2012年11月27日発行

名古屋エスペラントセンター Nagoja Esperanto-Centro
461-0004名古屋市東区葵一丁目26-10ユニブル新栄301号
郵便振替 00840-8-40765 [名古屋エスペラントセンター]
<http://homepage2.nifty.com/nagoja-esperanto/>



今までに発行されたエスペラント訳聖書のいろいろ
5ページの DEFIO AL BIBLIO-TRADUKADO FARE DE ESPERANTO

名古屋エスペラントセンターの
Zamehofa Festo 2012 は
12月16日
愛知民主会館で開きます。
詳しくは2pをご覧ください。

Zamehofa Festo 2012

日時：2012年12月16日(日) 14時から17時

場所：愛知民主会館 第三会議室

(名古屋市東区葵1丁目22の26 (☎052-936-7551))

会費：1,000円

主な内容：猪飼吉計講演 Pri la unua eldono de "Vivo de Zamenhof" de Privat (1920)

(新しい切り口での、実物展示つきの講演)

17時以降、近くの店にて懇親会を予定しています

プログラム

13:00：開場

13:30：受付

14:00：開会

開会挨拶

14:10：第97回エスペラント世界大会参加報告会

(写真投影のためプロジェクターの用意があります)

14:50：Prelego:猪飼

"<Vivo de Zamenhof> de Privat"


15:30：集合写真及び休憩

15:45：Unuminuta saluto de ĉiuj partoprenantoj

16:30：Prezentado de la filmo

エスペラント吹き替えによるアメリカの怪談映画の
さわりを紹介・・・東海大会で上映予定

16:40：閉会 → Amika Vespero en iu restoracio



第62回東海大会 予告 La 62a Esperanto-Kongreso de Tokaj

2012年5月26日(日) 四日市市文化会館が確保できました。

大会前泊のために近鉄四日市駅から近鉄湯の山線に乗り換え、終点湯の山まで25分の三重県菰野町湯の山にある「国民宿舎湯ノ山ロッジ」を検討中です。

講演などは検討中

記念品：「三重県エスペラント運動史」を準備中

テーマ：「地方のエスペラント運動を考える」とし、各団体の活動報告など

丹羽正久さん(1913-1999)の墓碑を訪ねて

前田愛子

8月26日、熱い日でしたがかねてから行きたいと思いつつも果たせなかったお墓参りを済ませることができました。丹羽さんは名古屋のエスペラント界で中心的に活躍され、私たち後続く者たちに良い足跡を残して逝かれました。私たち前田可一と愛子の結婚の御仲人さんでもあります。

お墓は大口町小口にあり、バローの東側の墓地にみつけ、白百合、ケイト、リンドウを捧げ、永年の失礼を詫び13年分のお線香を炊いてお参りして来ました。戒名は、「飛為翠光院和唱星窮居士」と記されており、墓碑の裏には写真のように“LA ANIMOJ de LA FAMILIO NIWA”と刻まれています。



第 100 回 日本エスペラント大会 (東京都江戸川区)

日 時: 2013年10月12日(土), 13日(日), 14日(月・祝日), 15日(火)

会 場: タワーホール船堀

(〒134-0091 東京都江戸川区船堀4-1-1 TEL: 03-5676-2211 <http://www.towerhall.jp/>)

主 催: 一般財団法人 日本エスペラント協会, 都区内エスペラント会連絡会ほか 後 援: 東京都江戸川区, ほか

La Jubilea 100-a Japana Esperanto-Kongreso en Tokio

Dato: la 12-a, 13-a, 14-a kaj 15-a de **oktobro 2013**

Kongresejo: Turo-Halo Funabori (Tower Hall Funabori), Kvartalo Edogawa, Tokio ;
ĝuste norde de la stacidomo Funabori

Kongresa Temo: *Esperanto ligas homajn korojn*
--- de la pli ol 100-jara historio al estonteco

Ĉefaj programeroj (provizoraj)

La 12-an de oktobro (sabate)

Posttagmeze: Fakkunsidoj, Inaŭguro

Vespere: Bankedo

La 13-an de oktobro (dimanĉe)

Antaŭtagmeze: Fakkunsidoj

Posttagmeze: Publika Prelego

Vespere: Publika evento (Koncerto ktp)

La 14-an de oktobro (lunde)

Antaŭtagmeze: Fakkunsidoj, Prelegoj

Posttagmeze: Fakkunsidoj, Prelegoj

Vespere: Amika Vespere

La 15-an de oktobro (marde)

Antaŭtagmeze: Fakkunsidoj, Ferma Soleno

Postkongresa ekskurso al Tokyo Sky Tree: planata

Memoraĵo: planata

Kotizoj: Eksterlandano venonta el ekster Japanio 2 000 enoj

Loĝanto plenaĝula en Japanio

5 000 enoj (ĝis la 31a de marto 2013)

6 000 enoj (ĝis la 31a de julio 2013)

7 000 enoj (post la 31a de julio 2013)

Pri ceteraj kotizoj (handikapulo, junulo, lernanto, alilanda studento, morala partopreno, ktp) demandu Konstantan Kongresan Sekretarion (vidu informon malsupran piednotan).

Loĝado: jek100@jei.or.jp / Listo de hoteloj prezentota

Postkongresa ekskurso : planata

Foto: 1 000 enoj

Lunĉo: la 13-an kaj 14-an de oktobro, 950 enoj potage



Pri plidetalaj informoj havu kontakton kun _____,

ĉe Japana Esperanto-instituto/ JP-162-0042 Tōkyō-to Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3

retadreso: jek100@jei.or.jp, telefono: +81-3-3203-4581, fakso: +81-50-3737-6438,

retejo: <http://www.jei.or.jp>

DEFIO AL BIBLIO-TRADUKADO FARE DE ESPERANTO

(本編は、Revue Orienta 2012年11月号に掲載された、猪飼吉計「国際計画言語による聖書翻訳への果てしない挑戦」から、本文の一部、主要参考文献、最後に、の三部分を除き、さらに加筆したものの本人エッセイです。)



IKAI Yosikazu

Iniciatantoj de internaci-planlingvo kutimas montri specimenon de Patronio de Evangelio laŭ Mateo, aŭ de komenca parto de Evangelio laŭ Johano, aŭ de Genezo. Estas tre limigita la nombro de internaci-planlingvoj, kiuj povis traduki aŭ eldoni pli ol unu ĉapitron el Biblio. Mi sube superrigardos la historion de bibliotradukado fare de Esperanto.

1-1. De 1887 ĝis 1897 (dek jaroj)

Laŭ tempa vicordo plej fruas Patronia kaj la komenco de Genezo de la Unua Libro. Sed laŭ sendependa libroforma eldono plej fruas la traduko de E. Neumark en Grodno: "La Libro Ruth". Unue ĝi estis rifuzita far La Esperantisto kaj sekvajare en 1893 Neumark proprakoste eldonis ĝin de Tümmel, presejo de La Esperantisto. En la antaŭparolo Neumark skribis ke li pretas eldoni ankaŭ "La libro Esther". Laŭ la januara numero (1894) de tiu gazeto traduko de "La libro Esther" far M. Goldberg (redakto far I. Lojko) estis transdonita tra Peterburga Esperanta klubo al la redakcio. Sed neniu el ambaŭ "Esther" estis publikigita. Cetere, estas konate nun ke en tiu tempo estis juda grupo en Odesse, kiu kunlabore tradukadis el Malnova Testamento en Esperanton. Estas supozate ke unu el tiuj judoj estas Kofman, kiu poste transiris al Ido. Ankaŭ li poste tradukis "Esther" sed ne en Esperanton, sed en Idon. Aldone mi menciuj L. de Beaufront, en kies traduko "Preĝareto por Katolikoj" (1893) estas kelkaj fragmentoj el Biblio.

1-2 De 1898 ĝis antaŭ 1907 (naŭ jaroj)

En la januara numero 1898 de Lingvo Internacia, M.S.Rakitski pledis por neceso de esperanta Biblio, kaj proponis fondon de traduka komitato en kiu Zamenhof estu la ĉefa redaktanto. Kunsentante kun tio Otto Svanbom kontribuis en junio-julia numero de LI el sia tradukoj novtestamentaj parton de 17a ĉapitro de "Faroj de Apostoloj". Li gvidadis komencantojn interalie en esperanta tradukado en Klubo Esperantista en Uppsala, kaj revis fondi en la klubo tradukan komitaton novtestamentan, kaj eldoni Esperantan Novan Testamenton en "Societas Bibliophilorum Britannica et Externa (Brita kaj Alilanda Biblia Societo)"

En 1906 en Leipzig eldoniĝis "La Evangelio Sankta Mateo laŭ D-ro Martin Luther" Tio estas dua libroforma esperanta traduko el Biblio. Tradukintoj estas W. B. Mielck kaj Fr. Stephan. Ĝi ne estas el origina greka lingvo, sed nur el Lutera germana versio. Antaŭparolon verkis teologo Alfred Jeremias. Samjare Leopold Blumenthal (Leo Belmont) tradukis kaj kontribuis la unuan ĉapitron de "Vortoj de Kohelet" en gazeto, sed ankaŭ tio ne estas rekta, sed nur tra la pola traduko, malsame kiel faris Zamenhof sekvajare en "Predikanto" en gazeto La Revuo.

2-1 De 1907 ĝis 1926

En 1907 dum la Universala Kongreso en Kembriĝo estis fondita Esperanta Biblia Komitato (Internacia Komitato). Ĝi konsistis el ĉefkomitatano John Cyprian Rust, Schneeberger (prezidento de la dua UK), kaj Peltie. En 1908 estis monofero por fondi organon de la komitato, kaj Rust akceptis ĝin kaj fondiĝis "Biblia Tradukisto" en Lüsslingen, hejmurbo de Schneeberger. En la unua numero estis tradukoj "Malaĥi" kaj "Letero al Filemon". Poste pretiĝis, por la dua numero, la unua ĉapitro de "Genezo", la tria kaj la kvara ĉapitroj de "Evangelio laŭ Sankta Luko" kaj "La letero al Filipinanoj". Sed oktobre 1908, post la Dresena UK, Schneeberger transiris al Ido. Ĉar Peltie jam de monatoj letere esprimis sian retiriĝon, nur Rust restis en la komitato. La dua numero forvapiĝis kaj la komitato ankaŭ.

Dume Zamenhofa "Predikanto" aperis en la marta numero 1907 de La Revuo de Hachette. Lia "Sentencoj de Salomono" aperinta en La Revuo aperis ankaŭ en North American Review konforme al la peto de ties redaktoro. "La Psalmaro" aperadanta en La Revuo estis ĉesigita duonvoje, sed poste lia tuta psalmaro libroforme aperis el Hachete en 1908. Cetere, samjare, el la sama Hachette eldoniĝis "La kvar evangelioj kunigitaj en unu rakonto". La tradukinto-kompilinto estis R. Laisney. 196 paĝoj.

En enlanda kongreso de Britio en Leeds 1909 denove Esperanta Biblia Komitato (enlanda komitato) estis alvokita kaj komenciĝis tradukado de la Nova Testamento. Januare de 1910 Zamenhof, kiu rigardis tion, demandis al Rust, ĉu ankoraŭ ne estis decidite kiu tradukos la Malnovan Testamenton. Zamenhof sciigis ke se ankoraŭ ne estis decidite, li mem estas preta akcepti tiun laboron.

En 1910 eldoniĝis tri libroj el Biblio, sendepende de la Esperanta Biblia Komitato. Tradukisto anonima "La libro profeto Cefanjao antaŭanoncinta Esperanton" (Presa Esperantista Societo). Temas pri 3:9 de tiu libro. Wren j. Gristead kaj aliaj "La evangelio laŭ Sankta Johano" (Esperantista Kolportista Asocio). Bostona edukisto Daniel Ozro Smith "Evangelio de S. Johano"

Ni revenu al Esperanta Biblia Komitato. Tri jarojn post ĝia refondo, do en jubilea 1912, jam eldoniĝis "La Nova Testamento de nia sinjoro kaj savanto Jesuo Kristo" el Brita kaj Alilanda Biblia Societo. Estis 613 paĝoj. La ĉefa tradukanto estis Rust, kaj la ĉefa kontrolanto estis A.E.Wackrill. Ili ankaŭ konsideris Zamenhofajn tradukojn de Malnova Testamento, dume eldonatajn de Hachette. La unua eldono estis elĉerpita en kelkaj monatoj. Sekvis diversaj formatoj aŭ eltiraj eldonoj. Tiu Nova Testamento estis unu el la plej bonaj tradukoj de la Nova Testamento tiutempaj. Tiu vesio de 1912 estis poste reviziita konforme al la Malnova Testamento dum la redaktado de La Sankta Biblio de 1926. Tial ankaŭ la nuna Nova Testamento estas aludita kiel 1926-jara versio.

Dume la unuaj kvin libroj de Malnova Testamento aperis en traduko de Zamenhof ek de la kvara numero de 1910 ĝis la unua numero de 1914

de La Revuo. Sed post forpaso de Boulet kiu havis grandan influon sur politiko de Hachette, la eldonejo rompis rilatadon al Esperanto, kaj Zamenhof enfalis en senelirejon. Ĉar li jam faris kontrakton kun la firmao tiel ke ĉiuj liaj libroj estu eldonitaj de Hachette, H.B. Mudie, prezidento de Brita Esperanto-Asocio, provis procesi anstataŭ Zamenhof por nuligi la kontrakton kaj reakiri kopirajton de la jam eldonitaj verkoj. Aldone Mudie akceptis proponon de fraŭlinoj Peckover, kiuj estis pretaj mone kompensi la tutan elspezon ĝis la eldonado de Malnova Testamento. Li peris tiun monoferon al koncernatoj inklude Zamenhof. Danke al tio Zamenhof trankviliĝis pri sia estonta vivtenado. Ĉar pro milit-eksplodo malmultiĝis klientoj, Zamenhof povis dediĉi sin pli ol antaŭe al tradukado, kaj jam en marto de 1915 li fintradukis Malnovan Testamenton. Pri "Libro de Ruth" li redakte uzis la tradukon de Neumark supre menciitan, kaj ankaŭ pri "Alta Kanto" li redakte uzis la tradukon, kiun J.H. Fred, edinburga judo, eldonis proprakoste en 1913.

En la 3a de marto 1915 Zamenhof sendis franclingvan poŝtkarton al Rust, informante, ke li ne povas sendi esperantajn manuskriptojn de la Malnova Testamento pro milita cenzuro. Li poste ripozis tri tutajn tagojn por celebri la fintradukadon kune kun sia familio. Sed estis nur fine de postmorta 1919, kiam lia tuta manuskripto laŭdire nete tajpita de Klara finatingis Londonon. Inter tiuj ĉi tri sendoj, unu estis tra Privat, kiu vizitis Varsovion pro porbiografia esploro.

Komence de 1920, manuskriptoj de ĉiuj 39 libroj de la Malnova Testamento fine disponiĝis je la Esperanta Biblia Komitato: ok libroj eldonitaj de Hachette (la manuskriptoj jam netroveblaj), sep libroj, kiujn Zamenhof sendis al Mudie en 1914, sed post akcidenta morto de ĉi lasta, estis deponitaj ĉe T.S. Lindsay apud Dublin, kaj la restantaj 24 libroj, kiujn laŭdire tajpis Klara. John Mabon Warden, kiu intertempe transprenis prezidantecon de BEA, akceptis ĉefredaktecon kaj ĝeneralan sekretariocon de la Komitato, kaj sub li komenciĝis la grandioza redakta laboro de la Malnova Testamento. La aliaj komitatanoj estis: Rust, J.Beveridge. Lindsay, J.E. McFadyen, A.

Loynder, C.J. Senior. Ankaŭ aldoniĝis al la laboro W. Page, W. Harvefa, fraŭlino Baird, akademiano W. Bailey.

La grandioza kvanto da redakta laboro estis farita sindediĉe kaj ĝisfunde por La Sankta Biblio: ĝustigo de traduk-breĉoj, ĝustigo de tradukaj eraroj, unuformigo de lingvaĵoj, glatigo de stilo, unuformigo de propraj nomoj, konsekvenco inter la Nova Testamento. Iuj redaktantoj dediĉis sian tutan libertempon dum la tutaj jaroj. Ekpresigo estis en aŭgusto 1925. Pretiĝis antaŭ la sekvajara Edinburga Universala Kongreso en 1926. Laŭ interna pritakso ĝi estis "pli Zamenhofa ol Zamenhof mem". Estis jam 19 longaj jaroj post la unua kunveno, kaj naŭ jaroj post la morto de Zamenhof. 5,000 ekzempleroj de la unua eldono elĉerpiĝis en kvin jaroj. Poste sekvis divers-formataj eldonoj aŭ eltiraj eldonoj. Sendube unu el la plej bonaj bibli-tradukoj de la mondo. Cetere, la tajpitaj manuskriptoj de Zamenhof dormis poste en BEA, sed finfine pro zamenhofologia celo estis fotokopie reproduktitaj en Nagoya en 1987. En 1988 D.B. Gregor publikigis sian komparon de tiu manuskripto kaj La Sankta Biblio en "La Zamenhofa teksto de la malnova testamento".

3) Post La Sankta Biblio

En 1931 "La manifesto de Jesuo Kristo" estis eldonita de Religious Tract Society en Londono. Temas pri 5a ĝis 7a ĉapitroj de Johano. Tradukinto estas nekonata.

Et 1960 Internacia Katolika Informejo en Tilburg, Nederlando, anoncis eldonadon laŭ la starpunkto de Katolikoj, kaj ek de la sekva jaro komencis aperigi kiel felietono tradukon de 1 kaj 2 Korintanoj. La felietonoj estis eldonitaj en libroformo de 80 paĝoj en 1969 kiel "kajero 7". Samjare IKI eldonis ankaŭ 168-paĝan "Evangelio laŭ Mateo (kajero 1)". Tiu traduko estis konceptita kiel esperanta versio de la tiam akklamata kiel epokfara franclingva biblio "La Bible de Jérusalem" (1956). La esperanta versio enhavas ampleksan ekzegezon kaj la propraj nomoj alprenis esperantan finaĵon. Entute nur tri kajeroj estis eldonitaj sed IKI mem ĉesis ekzisti kaj ankaŭ la projekto mem finiĝis duonvoje. La nomoj de tradukintoj ne estas indikitaj.

En 1967 fondiĝis Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj (IABO). Ĝia celo estas inter aliaj eldoni tute novan esperantan biblion "Nova Ekumena Biblio". La redakta politiko estis: fidela al la originalo, bonstila, neŭtrala, akceptebla ankaŭ por laikoj. En la tria numero de 1969 de Biblia Revuo, organo de IABO redaktita de Angelo Duranti, estis publikigita la prospekto de la projekto. Laŭ tio la ĉefredaktoro estas Donald Broadribb en Melburno, kaj varbitaj estas helpantoj en bibliolingvistiko, arkeologio, antikvahistorio, esperanto-filologio, biblioscienco. Ankaŭ mondonaco. Kaj estis decidite ankaŭ ke publikiĝu laŭokaze tradukoj en Biblia Revuo, La redakta komitato konsistas el du specoj de komitatanoj: A, kiuj ĉefe tradukas, B, kiuj ĉefe kontrolas la tradukitan tekston. Provizore la plano estas eldoni Malnovan Testamenton. En 1971 al la komitato apartenis dek kvin diversakonfesiaj personoj el dek unu landoj. Oni atendis eldonon de "La Psalmaro" en 1972, kio verŝajne ne realiĝis. Mi ne povis certiĝi, sed eble "Letero al Romanoj" kaj "la Duakanonaj Libroj" kaj "Apokrifo" estis publikigitaj en "Biblia Revuo". Sed la revuo ĉesis en 1985, probable por dediĉi tutan forton al la projekto de "Nova Ekumena Biblio". Ĝis nun, do post pli ol 40 jaroj, ne estas anonco de baldaŭa eldonado, kaj en 13a de oktobro 2012 la ĉefredaktoro D. Broadribb mem forpasis.

Aparte de la supraj komenciĝis sendependaj tradukoj far individuoj lastatempe. Unue Cherpillod eldonis "Kanto de Kantoj" en 1988. Ankaŭ Gerrit Berveling eldonis el Fonto kvar evangeliojn ĉiu en aparta volumo en 1994 ek de "La Bona Meŝaĝo de Jesuo laŭ Marko". Li eldonis ankaŭ "Nombro" en 1999. Li ankaŭ eldonis "La Duakanonaj Libroj" en KD en Freiburgo en 1997. Tiu ĉi poste eldoniĝis el Fonto en tri paperaj volumoj: La unua enhavas Tobit, Judit, Aldonoj al Ester, 1,2 Makabeoj. La dua enhavas Saĝeco de Salomono, Sirah, Baruh, Letero de Jeremia, Aldonoj al Daniel. La tria enhavas 1, 2 Ezraj, 3, 4 Makabeoj, La preĝo de Manase, Psalmo 151 k.a. Krome laŭdire ankaŭ D.B. Gregor tradukis "Saĝeco de Salomono".

Reage al tiuj ĉi Duakanonaj eldonoj, KELI kaj IKUE fondis La Ekumenan Komisionon, kaj tiu komisiono eldonis la pliampleksigitan "La

Sankta Biblio" en 2003 el Hongkongo, kiu enhavas ankaŭ tiun Duakanonaj Libroj.

KELI kaj IKUE entreprenis poste renovigadon de tiu 2003-a eldono, kaj en 2006 eldonis "Biblio" el Kavapech en Prago. En tiu nova eldono, intertitoloj estis nove enmetitaj, la kompostado tute novigita kaj reasignitaj estas la ĉapitroj de la Psalmaro. Sed plej grava diferenco dis de la 2003a eldono estas la pritrakto de la Duakanonaj Libroj. En la 2003a ili kune estis ĉe la fino de la Malnova Testamento, sed en la nova versio ili estis dise metitaj ĉiu en sia origina loko. Krome en la nova 2006a eldono, malsamaj litertipoj estas uzitaj por ke oni rekonu unuavide kiuj apartenas al la traduko de Zamenhof kaj kiuj ne.

Oni povas diri ke tiu 2006-a eldono estas la plej perfekta biblio iam eldonita en Esperanto. Ĝi estis elektita kiel ekstra ero de Oriento-Okcidento de UNESKO. Ni povas fieri je ĝi ke ĝi neniel estas malpli supera ol alilingvaj biblioj.

Lastloke ni aldonu aliajn tradukojn de Gerrit Berveling. En 2004 li eldonis "Leteroj de Paŭlo kaj lia Skolo" kiu enhavas plejparton de la leteroj novtestamentaj. Ĝi estis elektita en serio Oriento-Okcidento. En 2010 eldoniĝis "Flanke je Jesuo" kiu enhavas Agoj, Al la Hebreoj, Leteroj de Jakobo, de Petro (1,2), de Johano (1,2,3), de Judaso kaj Apokalipso. Per ĉi tio li finis sian tradukon de la tuta Nova Testamento.

Lia traduka laboro tamen ne limiĝas je tio. Li tradukis ankaŭ el Duakanonoj de Nova Testamento: "La Praevangelio laŭ Jakobo" (1990), "La evangelio laŭ Maria Magdalena (1985), "La Evangelio kopta laŭ Tomaso" (revizio 1994), Ĉiuj tradukoj prezentitaj ĉi tie de Berveling estas el Fonto. Karakterizaĵo de lia traduko estas detale piednotita teksto, kiu spegulas novajn bibliosciencajn atingojn lastatempajn.

Ankoraŭ daŭros en estonteco defioj de Biblio-tradukoj en Esperantujo.

エスペラントの古い貴重な資料を今**電子データ化しておきたい**と思う。戦前からのエスペラントの雑誌や資料を竹中治助さんは几帳面に収集し合本しておいてくれた。その内の一つ、ガリ版刷りの機関紙がセンターで見つかり、スキャナーにかけPDF書類にしてみた。1936年から1939年の“La Vinberbranĉo”だ。こうした先輩からの遺産を画像データとして電子化を進めていきたい。

しかし、問題は電子化できた書類データを今後どのように扱うべきかということである。個人のパソコンに入っているだけでは資料としての用を足さない。たとえ、それをCDとかDVDに取り込んで名古屋エスペラントセンターの本棚に保管しておくだけで事足りたとするだろうか。何十年か後に再生しようとしたとき、2012年には読み書きできたものが果たしてその時も再生できる機器が残っているだろうか。PDFというファイルフォーマットがあればこのようなハイパーテキストは残って行くだろう。しかし、本棚のCDは忘れ去られ、見つかったときは再生機を探すのに苦労するような時代が来ないとも限らない。

保管場所を特定のデバイスやDVDやSDカード上ではなくネット上に置いておけば我々が残した電子データもその時代の人々の目に触れる機会があろう。センタ会員だけでなく、ネットを覗くあらゆる人々に。ホームページに載せた資料は多くの人たちの検索の対象となりうる。

しかし、今センターが持っているホームページのプロバイダーを移行しなければならない事態が起きたとき、移行するための意思と財力がなければそれは当然ホームページ全体とともに消失することになる。そんな時の心配は私個人で作っているホームページもそうであるが、プロバイダーとの契約が切れれば消失することにならないか。

2004年に犬山で日本エスペラント大会を開いたとき大会のホームページを作った。大会を終了したあとこれをしばらくはネット上で保管していたが、日本エスペラント大会を統括するJEIがもっているホームページに移行してもらった。だから今でもそのページはNot Foundとはならずいつでも開くことができる。この方法は1999年の望月の大会から行われている。中には載せてない大会もある。

センターの資料も電子データ化したらまずはホームページに載せて広く閲覧に供したい。容量が不足してくれば増設が必要である、増設する力がなくなったら、どこか、エスペラント関係のホームページを管理するしっかりした団体に移行していくことになるう。

今回スキャナーを通した、70年以上も前のガリ版刷りを見たとき、和紙に刷ったものはわら半紙に刷ったものよりはるかに保存状態が良いことが分かった。鉄の留め金さえ錆びて朽ちているのに…。あの東海豪雨を耐えぬいた資料である。和紙と炭素の墨とかトナーによる資料がこれからも次代に遺していく最良の手段のようではある。水とか火から守られて。山田義

編集後記

Zamehofa Festoでお会いしましょう。Revuo Orientaに載った猪飼吉計「国際計画言語による聖書翻訳への果てしない挑戦」の著者自身によるエスペラント訳を載せました。今年の札幌日本大会での研究発表に山田が著者の許可をいただいて日本語で話しました。持っていった聖書の発行物を手にとって語りました。山田